

# Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN - PROPAGANDA

Verschiĝnt maandelijks  
Achtthende jaargang  
Nummer 4 (200)  
MEI 1951

Vertegenwoordiger in Nederland:  
L E E N  
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.  
postrek. 34563 van P. M. Mabeoone  
Pythagorasstr. 122, Amsterdam O.


Orgaan van de  
VLAAMSE ESPERANTISTENBOND  
POSTBUS 342, BRUSSEL  
Postrekening 2321.50 van V. E. B.

LIDGELDEN:  
\* Leden: 75 fr.  
\* Steunleden: min. 150 fr.  
Inwonende leden: 25 fr.  
(\* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN:  
België: 60 fr.  
Ceteraj landoj: 75 bfr.  
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

## NIA KONGRESO

L.E.E.N. — FL.L.E.  
AL HILVERSUM



Kongresejo: hotelo „Sanbergen”  
Noorderweg 2, Hilversum

### PROGRAMO:

Sabaton la 12-an de majo:

- 13.30 Malfermo de la akceptejoj.
- 15.00 Malfermo de la kongreso.
- 16.30 Oficiala akcepto en la urbdomo.
- 20.00 Interkonatiga vespero kun interesa programo, prizorgata de grupo el Brugge.

Dimanĉon la 13-an de majo:

- 8.30 Protestanta diservo.
- 9.00 Sankta meso kun prediko en Esperanto.
- 10.00 Jarkunveno L.E.E.N.
- 10.30 Jarkunveno FL.L.E.
- 12.15 Komuna fotografigo.
- 12.30 Komuna lunĉo.
- 14.00 Prelego de s-ro H. Vermuyten, poste daŭrigo de la jarkunveno L.E.E.N.
- 16.00 Vizito al A.V.R.O.-studio.
- 18.00 Komuna tagmanĝo.
- 20.00 Varia festvespero.
- 23.00 Balo.

Lundon la 14-an de majo:

- 10.00 Aŭtobusekskurso tra „Gooi”.
- 13.00 Lunĉo en Zeist en hotelo Boschlust.
- 15.30 Reveno en Hilversum.
- 16.00 Fermo de la kongreso.

Ankoraŭ malmultaj tagoj kaj ni kongresos! Tiam ni kune estos en Hilversum por labori kaj ĝui. Kio igas la ĉiujaran kongreson valora? Ne nur la festvesperoj, nek la harmonia pritrakto de la asociaj problemoj nek la bela ekskurso, sed antaŭ ĉio la kelktaga restado inter gesamideanoj el nordo kaj sudo, oriento kaj okcidento, kiuj ĉiuj — eble pef diversaj rimedoj kaj laŭ diversaj manieroj — laboras por la sama celo: disvastigo de Esperanto.

Dum kongreso ankaŭ la izole loĝantaj esperantistoj havas okazon kontakti kun la movado kaj ĝiaj adeptoj. Oni povas priparoli la problemojn de Esperanto, la movado kaj niaj asocioj; problemojn pli malpli okupintajn nin dum tuta jaro. Kongreso havigas forton kaj persiston por nova laborperiodo.

Nia ĉi-jara kongreso havas specialan karakteron, ĝi estas „Beneluksa”, do motivo plia por nepre ĉeesti ĝin.

Jam aŭdiĝas la sonorilo por la lasta etapo! Kiu aliĝos post la 5-a de majo ne plu ĝiru, sed pagu en Hilversum al la kasistino en la akceptejo.

## Wereldnieuws

In antwoord op een desbetreffend verzoek van H.E.K.K. heeft het gemeentebestuur van Den Haag aan de gemeenteraad voorgesteld een straat nabij de Boecopkade in het centrum van Den Haag Dr L. L. Zamenhofstraat te noemen.

Voor het deze zomer te München te houden Internationale Esperanto-Congres hadden zich eind Maart reeds 1135 deelnemers uit 29 landen aangemeld.

De Noorse „Folkets Brevskole”, de belangrijkste instelling voor schr. onderwijs geeft o.a. ook een Esperantocursus.

Aan de in Maart te Verona (Italië) gehouden Int. Jaarbeurs was een officiële Esperanto-inlichtingendienst verbonden.

„The Reference Catalogue of Current Literature” van 1951, die in alle grote Britse leeszalen etc. ter inzage ligt, vermeldt o.a. een vijftigtal Esperantowerken.

Het Wereldcongres van Esperantisten zal het volgende jaar worden gehouden te Oslo.

### Esperanto kaj Sociologio

En la Universala Kongreso de Esperanto en Parizo 1950 en la sekcio Sciencoj kaj Teknikoj, sub prezido de prof. d-ro Ivo Lapenna, la efektiviĝo de sistema kontakto inter esperantistoj kiuj laboras en la socia sektoro, -do personoj kiuj estas profesie okupitaj kun sociaj aferoj en iu senco, science aŭ aplike, - estas proponita de kelkaj kongresanoj.

Post la kongreso la prepara laboro por realizi la intencitan kontakton komenciĝis: formiĝis komisiono kiu ellaboris projekton kaj kies unua tasko nun estas alvoki la interesiĝantojn en la Esperantista mondo por konsideri kaj kune krei bazon por pliaj ebloj.

Ĉiun, kiu deziras kunlabori en la praktikado de la ideo „Esperanto en la socia sektoro” aŭ estas inklina doni sian helpon alimaniere ekzemple per montrado de nura atento al la temo, ni invitas sendi nomon kaj adreson kun mencio pri profesia funkcio, soci-sciencia, esplora aŭ aplika, al la sekretario de la internacia komisiono „Esperanto kaj Sociologio”, s-ro C. J. Keur, Moerweg 76; Den Haag, Nederlando.

## ULTRA MONTES N.V.

De Keyserlei 14      Arenbergstr. 17  
Antwerpen      Brussel  
Tel. 33.03.50      Tel. 12.55.02  
32.76.15

### Reizen naar alle bestemmingen

Spoor-, Vliegtuig- en Scheepsticketten tegen officiële prijzen onmiddellijk verkrijgbaar

Korespondas en Esperanto

Se vi deziras ke L.K.K. rezervigu liton por vi, nepre vi aliĝu tuj post ricevo de ĉi tiu gazeto, ĉar nek L.K.K. nek V.V.V. en Hilversum, kiu prizorgas la trankvilon, povas fari miraklojn.

Sabaton la 12-an jam ekvojaĝu matene por ĉeesti ankaŭ la malfermon kaj la oficialan akcepton.

Ĝis la revido en la kongresejo!

Bezoekt tijdens het congres de Esperanto-boekenstand!

## INTERESAJ ZAMENHOFAĴOJ

### RESUMO DE PRELEGO DE D-RO W. MANDERS

Por esti bona esperantisto ne sufiĉas ke oni evitu gramatikajn erarojn kaj lerte faru ĉiajn vortkunmetojn. Ni krome devas esprimi niajn pensojn tiel klare ke internacia publiko senpene komprenas nin. La gravecon de stilo klara trafe formulis *Theophile Cart*: „En Esperanto estas nur unu stila regulo: skribi plej klare. Kio estas klara, tio povas esti nekorekta, sed neniam malbona; en Esperanto estas nur unu malpermeso: skribi malklare. Kio ne estas klara, tio povas iafaje esti korekta, sed neniam bona” (Encikl. de Esp., p. 510). Se efektive la sola kriterio por bona stilo estas absoluta klareco, tiam sin altrudas la demando ĉu permeseblaj estas tiaj naciismoj, kiuj al internacia publiko impresas strange, sed kies signifo tamen estas facile komprenebla. Ĉu oni rajtas diri: la profito al ĉiuj falos en la okulojn (O. V. 123); la kunveno havos lokon morgaŭ (O. V. 206); iu pretendo estas prenita el la aero (O. V. 95); ĵetu okulon en lernolibron (O. V. 297)?

Kursgvidantoj verŝajne ne toleras tiajn esprimojn, kaj eĉ simplaj komencantoj instinkte evitos ilin. Tamen mi ĉerpis la cititajn ekzemplojn el la verkoj de Zamenhof mem, kaj intence mi citis nur ekzemplojn el la originala verkaro. Do tute ne temas pri tradukoj kaj la ekzemploj reprezentas puran zamenhofan lingvouzon. La demando nun estas, kiu pravas, ĉu Zamenhof kiu senĝene enkondukis tiujn esprimojn, aŭ la kursgvidanto kiu kondamnas ilin? Ŝajnas al mi ke ambaŭ pravas: se ni evitas tiajn esprimojn kaj anstataŭe precize difinas kaj ekzakte formulas niajn pensojn, ni certe esprimas nin klare. Sed aliflanke ni ne kondamnu la naciismojn sole pro tio ke ili estas naciismoj. Evitinda estas nur tio, kio efektive malhelpas la kompreneblon. Idiomaĵoj kies senco estas enigmo por alinacianoj estas ĉiam kondamnindaj, eĉ se Zamenhof mem enkondukis ilin, kaj eĉ se ili troviĝas en la Plena Vortaro. Tiaj esprimoj estas ekzemple la zamenhofa kalkuli muŝojn (laŭ P. V. „vane peni pri bagateloj”) kaj jen staras la bovoj antaŭ la monto (laŭ P. V. „jen la malfacilaĵoj”). Sed Zamenhof ne uzis tiajn esprimojn en sia originala verkaro. Ili troviĝas sole en liaj tradukoj, kaj estas pli ol verŝajne ke Zamenhof laŭvorte esperantigis ilin, sciante ke la kunteksto facile klarigas la signifon. Li tute ne volis definitive enkonduki tiujn esprimojn, sed li intencis montri kiel la aŭtoro de la originalo sin esprimis kaj li volis pruvi ke ĝuste en Esperantaj tradukoj oni povas atingi maksimuman konformecon al la originala formo. Malpravis ne Zamenhof, sed tiuj kiuj metis tiujn esprimojn en la Plenan Vortaron kaj tiel „oficialigis” ilin. Cetere tio ne estas motivo por krii alarmon. La P. V. havas tiom da bonegaj kvalitoj ke ĉiu serioza esperantisto regule konsultas ĝin. Kaj tamen ĉiu instinkte evitas uzi tiujn P. V.-esprimojn kiuj ne estas kompreneblaj al internacia publiko.

La unue cititaj ekzemploj (la profito al ĉiuj falos en la okulojn ktp.) estas ne tiel naciismaj kiel oni inklinas pensi. Ne nur vortoj, sed ankaŭ esprimmanieroj povas esti internaciaj. Multaj idiomaĵoj kiuj ŝajnas karakterizaj por nia propra lingvo, efektive apartenas al pluraj lingvoj. Precipe kiam ni turnas nin al eŭropa aŭ okcidenta publiko ni ne bezonas esti tro skrupulaj. Sed en publikaj destinitaj al publiko tutmonda ni uzu tiajn esprimojn nur se ili krom — relative — internaciaj ankaŭ estas facile analizeblaj kaj klaraj.

Zamenhof tre ŝatis uzi figurajn esprimojn. Verŝajne li vidis en tio plian rimedon por limigi la necesan vortprovizon. Precipe en la plej frua periodo Zamenhof ja evitis neologismojn (almenaŭ en la originalaĵoj). Plej ofte liaj figuroj estas simplaj kaj klaraj. Abundante la esprimoj en kiuj korpoparto ludas rolon (krei la lingvon de l' kapo ĝis piedoj; doni helpan manon ktp.). Ankaŭ mitologiaj kaj bibliaj esprimoj estas sufiĉe oftaj (siziŝa laborego, jupi-

tera graveco; voĉo krianta en dezerto, trinki la maldolĉan kalikon). Oni povas demandi sin ĉu tiuj mitologiaj kaj bibliaj esprimoj estas tolereblaj en tutmonda lingvo. Por homoj ne apartenantaj al la eŭropa civilizacio ili estas nekompreneblaj, kaj eĉ eŭropanoj bezonas jam certan erudicion por kompreni *siziŝa laborego*. Ĉu tiaj esprimoj do estas evitindaj? Mi kredas ke absoluta respondo tute ne eblas. La esperanta stilo devas esti klara, sed klara por kiu? Ja nur por la publiko al kiu oni sin direktas. Kio en scienca aŭ literatura revuo estas klara kaj tial pravigebla, tio povas esti enigmo en skolta revuo aŭ laborista gazeto. Kaj kio estas permesebla aŭ eĉ rekomendinda en gazeto pure eŭropa, tio povas esti netolerebla en revuo tutmonda. Ju pli vasta kaj diversspeca estas nia publiko, des pli severa fariĝu nia mezurilo.

W. Manders.  
El: Dansk Esperanto-Blad, 1951, n-roj 1/2.

## NEDERLANDAJ POETOJ EN TRADUKO

### LA NOTARIO PAROLAS

(DE NOTARIS SPREEKT)

E. du Perron (1899-1940)

Ĉi tie l' homoj diligentas kaj serenias. Ĉiam serenias. Rivereto jam: Publik' Dimanĉe multe fisas tie — post predik'. Plezuro vere sana en la urboj senas.

Kaj jen la linfabriko; iuj ĝin ne benas: Ĝi iom fortodoras. Tie la klinik'. Poŝtejo kaj biblioteko: koramik' Por libramant'. Lernejo nova ĝin entenas.

Sekvante l'rivereton nun, rapide ni atingos klostron de l' Indulga Sinjorino. Por la matriĉa kaj pentanta fiknabino. Matriĉa ja. Malpuran tolon lavas ŝi.

Mi pensas: ŝin ja donos iom ankaŭ vi. Ja ĉiujn tie ĉi vi ŝatos pro estimo.

trad. H. Vermuyten

## FLANDRAJ POETOJ EN TRADUKO

### EN TRADUKO

„La konscion pri propra „fendiĝeco”, kiel karakteriza animtrajto, kaj tial vundo neniam tute kuracebla, Guido Gezelle poezie figuris en multaj poemoj siaj. Malofte tamen li tiun konscion tiel senkaŝe esprimis samtempe tiel bele disfluigante ĝin en la imagon, kiel li faris en „Het Getouwe” (La Teksiĉo)...”

H. Roland Holst en „Guido Gezelle”

### LA TEKSIĉO

(HET GETOUWE)

Guido Gezelle.

Se estus mi duoblanima, kaj estus de duhoma spec', mi teksus krom je ŝtof' subtila, alterne je tutkruda pec'.

Teksajon ja el sun' kaj silko mi farus, el brokita or': kun arba kaj folia bildo, kun plura pli flatanta flor'.

Alia ŝtof': viv' dua, -iel mi sen atent' malvolve ĝin glitigus, nur teksita tiel hazarde, tra la teksmaŝin'.

Sed ne: de korp' kaj animbrilo de sola ŝtof' nur la teksist', -de dolĉ', amar', de krud', subtilo, -restados mi dum la ekzist'.

La veŝto, varp' de l' viv', -de bonaj, sentaŭgaj ŝtof' kaj silko, lan', fadenimplik', - estas Di-donaj, kun ie flor' sur teksa plan'.

Kaj sidas sur teksil' malfirma teksanta mi en ĉiu hor', plenfide ĉar Sinjoro ŝirma atendas al mia labor'.

trad. H. Vermuyten



OBSERVOJ

LA FRIPONA ESPERANTISTO.



En la rusa ĵurnalo „Vokrug Svieta“ (= ĉirkaŭ la mondo) aperis averto kontraŭ la malagrablaĵoj kiujn oni povas sperti per Esperanto:

En urbo Oĉakov esperantisto ŝuldis al sia dommastrino sufiĉe gravan sumon kaj skribis ŝuldateston en lingvo Esperanto. Monatoj forpasis, sed sin sensuldiĝi li tute neglektis. La dommastrino plendis ĉe la ĵuĝisto kiu vokis la esperantiston. Tiu ĉi tamen pretendis, ke li dume tute mallernis Esperanton kaj ne plu kapablas decifri la propran skribaĵon, kiu restis enigma por li, por la dommastrino kaj por la ĵuĝisto. Kaj averte la rusa ĵurnalo aldonas: „Evitu akcepti de viaj ŝuldataj ŝuldatestojn skribitajn en tiu ĉi lingvo, kiun oni povas forgesi post tri monatoj“.

Tio vere okazis en 1899, laŭ „Lingvo Internacia“, numero 37 de julio 1899. Sajnas al mi, ke la diplomatoj dume lernis de la fripona esperantisto ...

Pik.

HILVERSUMA KONGRESO ALIGIS ĜIS 15-III

150 s-ro D. Baart, Enschede, 151 fino C. Beyer, R'dam, 152 s-ro H. Korte, Veendam, 153 s-ro J. Rooker, A'dam, 154, 155 s-ro F. sino G. A. Posen, Den Haag, 156 s-ro H. Mabesoone, A'dam, 157 fino A. Stapelkamp, Winterswijk, 158, 159 ges-roj De Wolf, Haarlem, 160, 161 ges-roj Put, Hilversum, 162, 163 ges-roj Niemeyer, Sneek, 164 s-ro H. Luyke, Katwijk a. Zee, 165, 166 ges-roj Slot, Zeist, 167 sino G. Martin, Zeist, 168 sino J. v. Hemert, A'dam, 169 fino G. v. Streun, Zeist, 170 s-ro B. Albers, A'dam, 171 sino E. Borst, A'dam, 172 sino R. v. Veen, Hilversum, 173 fino A. Raadsveld, Haarlem, 174 s-ro B. v. Moorst, Bussum, 175 fino D. v. Dieren, Winkel, 176 s-ro R. Korrelboom, Den Haag, 177 s-ro Y. Kingma, Leeuwarden, 178 fino S. Biesma, Den Haag, 179 fino J. v. Dijk, A'dam, 180 s-ro J. Bosschaart, Breda, 181 sino J. v. Oort, Hilversum, 182 fino R. Weller, Zwolle, 183, 184 ges-roj Jacoby, A'dam, 185 s-ro R. Jacoby, A'dam, 186 fino N. Daams, A'dam, 187 fino N. Boers, A'dam, 188 sino L. Hovenier, Hilversum, 189 fino G. Leussink, Naarden.

Aligis ĝis la fino de aprilo jam preskaŭ 250 personoj. Inter ili troviĝas famkonataj esperantistoj, i.a. s-ro H. W. Holmes, prezidanto de la Londona Esp. Grupo kun sia edzino kaj s-ro S. Pragan.

INTERNACIAJ FERIAJ KURSOJ

okazos 22-29 julio en Helsingör (Danlando)

Karavano el Nederlando aranĝata de s-ro P. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, A'dam-O

Detala prospekto ĉe L. Friis Ingemannsvej 9, Aabyhøj (Dan.)

GULDENSPORENPRIJKAMP VOOR DE VLAAMSE JEUGD

De Vlaamse Toeristenbond richt vanaf dit jaar weer zijn traditionele Gulden-spen-prijskampen in.

Ditmaal wordt een gedicht gevraagd of een prozastuk dat Vlaanderen of een Vlaamse streek, een Vlaamse gemeente, een Vlaams landschap of monument op een verantwoorde wijze verheerlijkt.

Mogen aan deze prijskamp deelnemen: alle Vlaamse jongens en meisjes tussen 15 en 25 jaar.

De inzendingen, die volstrekt oorspronkelijk en onuitgegeven moeten zijn, worden op het hoofdsekretariaat van V.T.B., Sint-Jacobsmarkt 15, Antwerpen, ingewacht tot uiterlijk 15 Juni. Boekenprijzen voor een totaal bedrag van vijf duizend (5.000) frank worden toegekend en wel voor de helft aan dichters voor de andere helft aan prozastukken. De winners mogen zelf, volkomen vrij, de oorspronkelijk-Nederlandse boeken aanduiden die ze verlangen.

Een bevoegde jury doet uitspraak vóór 11 Juli. Op deze datum wordt in een der bondsgebouwen, te Antwerpen, Brussel of Gent, de plechtige prijsuitdeling gehouden, omlijst door een fijn Gulden-spen-programma.

LA STUDANTO

Uitwerking van de opgaven in het vorige nummer:

Gardostaranto — ekzamenoto — sumpumi — militkaptito — plenumigi — malkuraĝulo — pragepatroj — vigleco — kapkovrilo — plenagulo — mallumega — leterportisto — diktatora — krudulo — neperfekta — nelacigebla — akceptebla — buŝtuko — litkovrilo — sendifekta — avarulo — memorinda — samdomano — vangfrapo — kolere — ma — sklavigi — malvigli (konsumigi) — subaŭskulti — antaŭtuko.

Stapvoets — mensenschuw — onvoorwaardelijk — biechtvader — openluchtbad — scheiden — stakker — toegewijd — zich misdragen — dreumes — slaapwagen — naaste — traag — bespioneren — demonteren — activiteit — schillen — haarkloverij — verhuizen — critisch.

1. Ĉar (pro tio ke) li estas malsana, li morgaŭ ne iros al la lernejo. 2. Li restis trankvile sidanta en la momento kiam (en kiu) mi eniris la ĉambron. 3. Ĉu via amiko jam estas resaniĝinta? 4. La prezo de ĉi tiu libro estas du guldenoj; bindita ĝi kostas unu guldenon pli. 5. Oni elektis s-ron Jansen kiel prezidanton de la asocio. 6. El la du fratinoj Karlo povas kanti pli bele. 7. Li malavare rekompencis la trovinton, donante al li grandan sumon da mono. 8. Ĉu la produkto de kvin kaj kvar estas dudek?

parolas flu —, sed post kelk — tagoj mi vizitos la kongreso de F.L.E.E. kaj L.E.E.N. por ekzerki mi en la konversacio. Ĉi tiu karto montras kelk — logantoj de la vilaĝo Volendam, kiuj portas ankoraŭ si — tip — naci — kostumoj. Esperant — ke vi baldaŭ denov — sendos al mi bel — karto, mi samidean — salutas vi.

Vertaal:

1. In onze stad staat een huis dat groter is dan de toren van deze kerk. 2. Over de rivier staat een houten huis, waarin een arme weduwe met haar drie kinderen woont. 3. Als ik zo ziek was raadpleegde ik een dokter. 4. Onze dienstbode kocht bij de slager drie pond varkensvlees. 5. We zouden juist gaan zitten toen er gebeld werd.

APOZICIOJ

Apozicioj, t.e. substantivaj epitetoj, determinantaj aliajn substantivojn, akordigas kun siaj determinatoj laŭ kazo; do se la determinato staras en akuzativo, ankaŭ la apozicio havas la literon n, ekz.: mi vizitis mian amikon, la kuraciston — mi adiaŭis Johanon, la fraton de mia najbaro — la diablo lin prenu, la sentaŭgulon — Dio indulgu nin, pekulojn — li mangis ĉiajn fruktojn: ĉerizojn, fragojn, grosojn, ktp. Anstataŭ dupunkton oni en la lasta frazo kaj samspecaj frazoj same bone povus uzi la adverbos nome aŭ la adverbos

KOMUNIKOJ DE LA LIBRO-SERVOJ.

	Gld.	Belg. Fr.
Retoriko, originale verkita de d-ro I. Lapenna: unu el la plej valoraj verkoj, ĝis nun eldonitaj en Esp.		70,—
Ni ankaŭ povas rekomendi:		
Kredu min, sinjorino!, de C. Rossetti (bind.)	5,40	73,—
Miru-Pensu-Ridu, de P. Bennemann (bind.) (legu la favorajn recenzojn en la marta numero!)	5,40	73,—
Skizoj pri Nederlando (nur kelkaj ekz.!) Esperanta Krestomatia (kart.)	1,75	24,50
Pro Istar, de H.A. Luyken (bind.)	4,50	61,—
Gösta Berling, de S. Lagerlöf (broŝ.)	4,80	66,—
La mondo ne havas atendejon, de M. Dekker	2,50	82,50
Fundamenta Krestomatia, de L. Zamenhof	5,20	72,—
10 leterpaperoj kun kovertoj kun surskribo: „Esperanto, lingvo internacia“	0,50	—

Insignoj:

rondaj 5 mm, verda stelo sur blanka fono, (pinglo)	—	10,—
rondaj 12 mm, verda stelo sur blanka fono (butono aŭ broĉo)	—	12,—
stelforma, verda stelo kun blanka rando kaj orumita E. (butono aŭ broĉo)	—	13,—
pentagonforma, verda stelo sur blanka fono kaj orumita E. (butono aŭ broĉo)	—	13,—
diversaj glumarkoj (rondaj, kvadrataj, steloj) 100 ekz. 0,50	—	6,—

speciale por B-kandidatoj:

Marta, trad. de L. Zamenhof (uzitaj sed bonuspektaj ekzempleroj) 2,—

Vizitu la standon de la libroservo en la kongresejo!

MENDU ĈE

Boekendienst L.E.E.N., Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, (giro 76915) Vlaams Esperanto-Instituut, Blankenberge steenweg 72, Brugge (p.c.r. 3268.51)

Siajn, sia, iliaj. Siajn, lia, ilia, ilia, ilia. Sian, iliaj. Sian (!), iliaj. Sian. Ilian, iliaj. Iliaj, sian, siajn. Sian, iliaj. Sian. Sia.

En iu klubvespero mondvojaĝisto por la tioma fojo (la tioman fojon) rakontis aventuron, kiun liaj amikoj jam tiel ofte aŭdis, ke ili sciis parkere la historion laŭvorte. Li rakontis, kiel li savis sin de morto (evitis la morton) en la malproksima okcidento de Ameriko.

„La nokto sternigis (mallevigis) sur la pejzaĝo(n) ... Mi staris sur alta ponto admirante (kaj admiris) la imponan ĉirkaŭaĵon. Antaŭ mi osced(ad)is profunda abismo ...“

„Diru“, tiam interrompis iu el la klubamikoj, „Ĉu tiu abismo jam osced(ad)is antaŭ ol vi venis tien?“

Vul in: e, a(n) of aj(n) en voeg waar nodig de letter n toe:

Kar — amiko.

Tutkor — mi dankas vi pro vi — bel — poŝtkarto ilustrit — kiu mi la pasint — semajno ricevis, kaj kiu montras klar — la grandeg — amplekso de vi — urbo. Volont — mi regul — korrespondos kun vi en Esperant — pri divers — temoj. Ĉu vi studis long — tempo? Mi partoprenis element — kurso dum ses monatoj kaj sendub — faras ankoraŭ mult — eraroj, sed lernant — oni lernas fari, ĉu ne? Mi ankoraŭ ne

esprimon tio estas (t.e.), ekz.: li mangis multajn fruktojn, nome ĉerizojn, fragojn, grosojn, ktp. — li havas tri infanojn, nome du filinojn kaj unu filinon — la akuzativo montras direkton, tio estas movadon al la loko — li ricevis duoblan pagon, t.e. dek guldenojn.

Se oni povas antaŭigi la apozicion per nomata(j)n, oni plej ofte metas ĝin en nominativo, ekz. li vizitis la urbon (nomatan) Parizo — li adiaŭis sian fraton Paŭlo — li legis la romanon Viktimoj. Same citaĵoj per kiuj oni citas vortojn gramatike sendependajn de la ĉirkaŭa frazo, staras en nominativo, ekz.: li ricevis la titolon princo — ĉu vi komprenas la vorton „sledo“?

Vertaal:

Een automobiefabrikant maakte bekend, dat zijn fabriek er in geslaagd was één wagen in zes en zestig minuten in elkaar te zetten. De volgende morgen werd hij opgebeld door iemand, die vroeg, of dat werkelijk waar was. „Ja zeker“, zei de fabrikant trots, „maar waarom vraagt U dat?“ „O, nergens om“, zei de ander, „maar ik denk, dat ik die wagen getroffen heb.“

Uitwerkingen van Vlaamse cursisten voor 20 Mei aan V.E.B., Studanto, postbus 342, Brussel; van Nederlandse cursisten aan A.J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Z.

VERDLANDO VOKAS

Listo de radio-disaŭdigoj en aŭ pri Esperanto kaj informoj. Tempindiko laŭ MET (= mezeŭropa tempo) valida ankaŭ en Nederlando kaj Flandrujo.

Mallongigoj: I = informoj. P = parolad(et)o. K = kurso. M = muziko.

Dimanĉe:

17.00—17.20 Romo, 25,2 m, 42,19 m: I kaj M.

19.00—19.15 Sofio, 39,11 m: I.

Lunde:

8.15—8.30 Stokholmo, 19,80 m, 49,46 m: I

8.45—9.00 Rijsseĉ (Lille), 234 m: P.

15.30—16.— Rio de Janeiro, 30,71 m, 375 m: K.

16.15—16.30 Stokholmo, 19,80 m, 27,83 m: I

23.15—23.20 Hilversum II, 298 m, VARA: I. (Nur ĉiudusemajne).

Marde:

2.15—2.30 Stokholmo, 19,80 m, 27,83 m: I

12.55—13.00 Berno, 13,94 m, 31,46 m, 48,66 m: P. de d-ro Arthur Baur

18.35—18.40 Berno, 19,60 m, 31,46 m, 48,66 m: Ripeto de la tagmeza dissendo.

Merkrede:

0.30—0.45 Gvatemalo, 49 m: I.

22.35—22.40 Vieno, 25 m, 48 m, 513,7 m: I.

Ĵaŭde:

9.30—9.45 Parizo, 48,39 m, 347 m: K.

12.55—13.00 Berno, 13,94 m, 31,46 m, 48,66 m: P. de d-ro E. Privat.

18.35—18.40 Berno, 19,60 m, 31,46 m, 48,66 m: Ripeto de la tagmeza dissendo.

18.10—18.25 Vieno, 30 m, 203 m: P. (ĉiun duan ĵaŭdon).

Vendrede:

17.00—17.20 Romo, 25,2 m, 42,19 m: I kaj M.

Sabate:

21.00—21.15 Sofio, 39,11 m: I.

23.15—23.20 Hilversumo I, KRO, 402 m: I

Informojn pri Esperanto-radio-elsendoj sendu ne nur la radio-stacioj, sed ankaŭ la radio-aŭskultantoj al: S. S. de Jong Dzn, Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, Tjerkerwerd (Fr.), Nederlando.

NIAJ SOMERAJ KURSOJ

Ĉu vi jam aliĝis al la someraj kursoj, kiujn aranĝos F.L.E.E. kaj L.E.E.N. kaj kiuj okazos 26 julio-2 aŭgusto en Soesterberg? Se vi prokrastos vian aliĝon ĝis la lasta tago, vi ne nur kaŭzos multajn malfacilaĵojn al la organizantoj sed krome riskas esti rifuzata pro manko de loko. Jam multaj gesamideanoj anoncis sin. Imitu ilian ekzemplon!

Ĉu vi ne scias la detalojn kaj ĉu vi deziras informojn? Petu senpagan prospekton de s-ro C. B. Zondervan, Sweelinckstraat 2, Deventer kaj senprokraste aliĝu!

SOMERAJ ARANĜOJ

Hardanger (Norvegujo): Int. feria semajno 23-30/VII. Informoj: Box 132, Haugesund, (Norvegujo).

Nürnberg: Postkongreso 11-13/VIII. Informoj: s-ro O. Pilhofer, Mögelderfer Hauptstrasse 2, Nürnberg (Germ.).

Kochel (Germanujo): Int. Junularkunveno 11-17/VIII. Informoj: s-ro H. Heiss, Engelbertstrasse 7, München-Pasing 13 b (Germ.).

München: Diversaj postkongresaj vojaĝoj 12-16/VIII. Informoj: s-ro E. Moravec, Engelbertstrasse 7, München-Pasing 13 b (Germ.).

Dalshøj, Bornholm (Dan.): Int. arkeologia tendaro por studentoj 3-17/VII. Informoj: Dana Int. Studentkomitato, universitato St. Pederstraede 19, København-K.

Kolonjo: Antaŭkongresa Esp. renkontiĝo 2-3/VIII. Forveturo per speciala vagonaro al München. Informoj: s-ro J.F. Berger, Ehrenbergstrasse 1, Köln-Riehl (22c), Germ.

Ljubljana (Jugoslavujo): XV-a Jugoslava Esp. Kongreso 7-10/VII. Dum kaj tuj post la kongreso internacia somerrestadejo en la plej belaj turismaj lokoj de Slovenio. Informoj: Slovena Esp. Ligo, Cankarjevo nabrežje 7/1, Ljubljana (Jugosl.).

Londono: Esp. ferio en „Ambassadors Hotel“ kun partopreno en „Festival of Britain“ 23-30/VI. Vizito al ekspozicioj, koncerto, amuzparko, k.t.p. Informoj: s-ro N.R. Smith, 153 Drummond street, Euston N.W.1, Londono.



**NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA“**

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst: Mr A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, tel. 96160. Penningm.: P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O, postrek. 34563. Boekendienst, schr. cursus voor gevorderden en dipl. B: H Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, postrek. 76915. Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht. Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320. Alg. Ned. Esp. Examen-comm.: Mej. H. M. Mulder, Zilvermewuustr. 29, Badhoevedorp Cefdel. U.E.A.: P. Moen, Schaarsbergenstraat 104, Den Haag, postrek. 79167.

**KOMUNIKOJ DE LA ĈEFESTRARO**

**Jarkunveno**

La delegitoj, kiuj transdonu sian ateston duonan horon antaŭ la komencigo de la jarkunveno al la ĝen. sekretario, ricevos detalan tagordon de la kunveno kune kun siaj kongresdokumentoj en la akceptejoj. Aliaj interesigantoj ricevos senpagan ekzempleron ĉe la komencigo de la kunveno. La teksto de la jarraporto, budĝeto, bilanco, k.t.p. troviĝas en la januara, februara, marta kaj aprila numeroj de „Nederlanda Esperantisto“, kiujn oni bonvolu kunpreni al la jarkunveno.

Kiel kutime aperos sur la tagordo la punktoj: kritiko pri la gvidado de la ĉefestraro kaj kritiko pri la redaktado de „Nederlanda Esperantisto“. La sekcijaj estraroj sciigu event. preparolotajn temojn antaŭ la 8-a de majo al la ĝen. sekretario.

**FL.E.**

**JARRAPORTO 1950**

Karakterizi la tutan jaron 1950 per unu sola vorto, ne estas malfacile: stagnado. Jen, la grava vorto elbuŝiĝis, kaj ni certas, neniu ne atendis tiun vorton. Ĉar ne nur la ligo, sed ankaŭ la sekcioj kaj la reprezentantoj sentis dum tiu jaro, ke la entuziasmo ofte mankis. Memkritiko estas la unua paŝo al plibonigo. Sed ni nepre serĉu kialojn kaj laŭ ni, ili estas duoblaj: granda ekstera kaŭzo estas la pli kaj pli fuŝita internacia politika situacio, kaj interne, laciĝo post 5 jara streĉado postmilita. Se ni akceptas tiujn du kialojn, la rimedoj por ŝanĝigi almenaŭ la laste menciitan, ne forrestos. La sekcioj daŭrigis la senfinan laboron en la urboj, kaj la reprezentantoj iom post iom pligrandigas la lokan kernon. Dum la ripozo, ĝi necesis - eĉ se ĝi daŭris preskaŭ unu jaron, - la nova Esperanto-batalo ekgermis, kaj la unuaj pruvoj anoncantaj ĝian eksplodon jam ekestis dum la fino de la jaro 1950. Ni ja konstatis, ke multaj kursoj estis organizitaj je la jarfino kun sufiĉe multaj lernantoj: la finan rezultaton ni ne jam konas, sed la raportoj estas favoraj.

Dum 1950 la ligo kunigis 295 geesperantistojn laŭ jenaj kategorioj:

Subtenaj membroj:	14
Membroj	244
Enloĝantoj	37
	295

La eldonnombro de „Flandra Esperantisto“ tamen estas 700, ĉar ni bezonas ankoraŭ kelkajn ekzemplerojn por eksterlandaj abonoj, por la enlanda gazetaro kaj intersanĝe, kaj ni forvendas apartajn numerojn. La reston ni dissendas pere de Flandra Esperanto-Instituto al mendantoj de libroj kiuj ne troviĝas sur la membrolisto.

En la ceteraj punktoj de la raporto, ni laŭvice pritraktas la aktivecon de la sekcioj kaj la diversaj aliaj fakoj de la ligo.

**1. LA SEKCIOJ.**

Krom la 9 jam „malnovaj“ grupoj, Roeselare envicigis. Kvin el ili anoncis vintran kurson: Brussel, Brugge, Gent, Leuven kaj Mechelen. Sekcio Oostende organizis nian 15-an kongreson plensukcese, kvankam la nombro de la gepartoprenintoj malsuperis tiun de ĉiuj antaŭaj kongresoj. Sekcio Mechelen ree kaptis la gruppremion por la varbado.

**2. LA REPRESENTANTOJ.**

En Kortrijk la esperantista kerno plivigliĝis kaj eĉ organizis kurson kun deko da lernantoj. La starigo de sekcio estas planata.

**3. FLANDRA ESPERANTISTO.**

Cefredaktoro dum la tuta jaro estis d-ro Th. van Gindertaelen. Ekde la januara numero, ni presigas ĝin en Nederlando kaj samtempe ni petis al L.E.E.N. transpreni la ĉefredaktorecon, kiam d-ro Van Gindertaelen restis redaktoro por la kontribuajoj de Flandra Ligo. La Ligo ŝuldas multon al li, ĉar ĉu ni povus trovi en niaj vicjoj pli idealan redaktoron? El organiza kiel el lingva vidpunkto li modele estris la eldonaĵojn kaj ni nur povas esperi ke Flandra Esperantisto kresku, kvalite, kvante kaj volumene por ke lia laboro konatiĝu pli kaj pli en la mondo. Bedaŭrinde en la ĝenerala kunveno de

Ĉiujn deziratajn informojn pri la karavanojoĝo al la Universala Kongreso de Esperanto, okazonta 4-11 aŭg. en München, volonte donas al vi la karavangvidanto s-ro W. Böttcher, P. C. Hooffstraat 25, Leeuwarden.

**Ekzamenoj**

Ekzamenoj A kaj B okazos sabaton la 16-an de junio en Hago. Oni anoncu sin kiel eble plej baldaŭ. Prospektoj senpage haveblaj ĉe la ĝen. sekretario de L.E.E.N.

**N.C.K.E.**

Sabaton la 14-an de aprilo okazis en Amsterdam la jarkunveno de N.C.K.E. Kiel prezidanton oni elektis s-ron mag. A. J. Kalma; sekretario estas s-ro J. Pouli, Elegaststraat 19, Amsterdam-W.

la 19.11.1950 ni anoncis ke la planita aldono de du paĝoj ne realiĝos por ne endangerigi nian budĝeton. Envere, mankas al ni loko por plivariigi la temojn laŭ deziro de niaj membroj, kaj samtempe uzi la gazeton por la organizaj bezonoj nepre necesaj por la bona funkciado de la asocio.

**4. LA GAZETAR-SERVO.**

Ĝi daŭrigis dum la tuta jaro la publikigon de propagandaj artikoloj en la nederlandlingvaj ĵurnaloj. De tia agado profitis ĉiuj esperantistoj senescepte, ĉar nur malofte ni menciis la fonton de la novaĵo. Ekde la funkciigo de la U.E.A. gazetarservo, ni kunlaboris.

**5. LA EKSPOZICIA SERVO.**

Organizis standon en la kongresa akceptejo kaj helpis la sekciojn pruntedonante propagandmaterialojn.

**6. AMIKO-VARBADO.**

En 1950, 92 simpatiantoj fariĝis amikoj (1949, 387).

**7. SOMERAJ KURSOJ**, en „Oolgaardthuis“ (Arnhem).

Detala raporto aperis en F.E. no. 9 (Septembro). Ĉirkaŭ 80 gepartoprenantoj inter kiuj 12 eksterlandanoj.

**8. GENERALA PROPAGANDO.**

Bonege sukcesis la rondvojaĝo de F-ino Tusveld kiu paroladis pri Japanujo en Antwerpen, Mechelen, Gent, Rumbekke, Brugge kaj Kortrijk. Ĉar kelkaj el tiuj paroladoj estis organizitaj en kunlaboro kun turistaj aŭ kulturaj asocioj, ĝi ankaŭ el propaganda vidpunkto ege valoris.

Nia vicprezidanto, drs F. Roose, kiu travojaĝis Okcidentan Flandrion kun la Esperanto-filmo pri Danlando, multege propagandis por nia movado. Ekz. la prelegvespero en Roeselare logis 350 eksterstarantojn.

**9. KORESPONDA SERVO.**

Ĉiujare partoprenas la lecionojn 5-12 personoj, el kiuj la pli granda parto poste membriĝas. La financa situacio:

Enkase	769,75
6 kotizoj	600,—
	1369,75

15 kursbroŝuretoj	441,60
Repago de kotizo	100,—
Postmarkoj	126,30
Gajno	701,85
	1369,75

**10. KUNVENOJ.**

Okazis du ĝeneralaj kunsidoj (Brussel kaj Oostende) kaj tri estrarkunvenoj (2 en Gent kaj 1 en Brussel).

La ĝenerala sekretario  
Gr. Maertens.

**AUTORITEITEN TE WILSELE BEVORDEREN E.-ONDERWIJS**

In de loop van December hadden 2 leden van de V.E.B. afdeling Leuven n.l. Cl. Verbeek uit Wijgmaal en ondertekenaar een afspraak met de Heer Burgemeester van Wilsela over het inrichten van een E.-cursus in deze gemeente (plm. 7.000 inwoners). Er werd besloten, op 6 Januari 1951 een aanvang te maken met een avondcursus.

Een tiental dagen vóór die datum, stuurde het gemeentebestuur zelf een

**Flandra Ligo Esperantista.**

Postbus 342, Brussel.

Sekretario: G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, Sint-Kruis. U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 161.55. Redakcio F.E.: Dr. T. van Gindertaelen, Louisastr. 23, Mechelen.

**NIA KONGRESO**

Jam multaj ligoj aliĝis al nia XVI-a! Ĉu la nombro de la gepartoprenantoj atingos tiun de Oostende (nia XV-a)? Versajne. Se vi ankoraŭ hezitas, pripensu ke la elspezoj entute (vojaĝo kaj aranĝoj) apenaŭ superas la kostojn por enlanda kongreso. El financa vidpunkto, la plej bona vojaĝmaniero por la loĝantoj de Orienta kaj Okcidenta Flandrioj estas jena:

Brugge-Breskens (aŭtobuse); Breskens-Vlissingen (boate senpage); Vlissingen-Hilversum (ire kaj revene: 11 g.) Oni fakte elspezas eĉ ne 200 Fr.! Ĉar la somera periodo komenciĝas iom antaŭ Pentekosto, ni ne povas sciigi la ĝustajn forir-horojn; ni tamen komunikos ilin al ĉiu, kiu demandos tion al la sekretario.

Por Antwerpen, Brussel, Leuven kaj Mechelen, aŭtobusa aranĝo okazos: ĉiujn informojn ĉe la karavanestro s-ro E. Cortvriendt, Diepestr. 44, Antwerpen.

**PETO:**

Ĉiujn eventualajn proponojn por la jarkunvena tagordo en Hilversum oni ensendu tuĵ. Dum la jarkunveno, la sekretario i.a. respondos demandojn pri gravaj problemoj tuŝitaj de la ensendintoj de la demandaro.

**NEKROLOGO:**

Ni ekscias la forpason de s-ro J. Mallet (20.3.51), patro de nia ĝen. sekretario kaj de lia edzino-samideanino. Al ambaŭ kaj al la familio niajn sincerajn kondolencojn (red.).

**STOPU LA TRUON EN LA DIGO:**

La kasisto kompilis liston de ĉiuj kiuj ĝis nun ne pagis la kotizon por 1951. Al ĉiuj sekcioj ni sendis la adresojn de samurbanoj, eksmembroj, kiuj troviĝas sur tiu listo. Jam plurfoje ni metis la fingron sur la plej gravan malsanon de la movado, nacia kiel internacia. La malfideleco de granda nombro da Esperantistoj efikas kiel truo en digo, ĉirkaŭanta plenigotan lagon: sed kiom ajn oni enverŝas, konstante forfluas kvanto, tiamaniere ke la nivelo restas sama!

Tial ni ĉi-foje ne organizas varb-kurson, sed donos 5 poentojn al la sekcio, kiu revarbas eksmembrom 1950 (ankaŭ familian membron!). Ni konstatis ke ĉiujare multaj Esperantistoj nov-aligiĝas, sed ke preskaŭ same multaj samideanoj dizertas, neniigante la klopodojn de la kursgvidantoj!

Eblas ke per nura persona instigo de iu fidelulo, ili denove membriĝos... sed, se neniu petos tion, ili estos por ĉiam perditaj.

Kelkaj jam streĉas la orelojn, ĉar ili legis ion pri „konkurso“ Ni kompreneble donos premion, kaj ĝi konsistos en kelkaj libroj, kiujn la sekcioj ricevos, ĉu por la biblioteko, ĉu por loterio inter la gegrupanoj. Fino de la konkurso: 1.6.1951. Se vi revarbas eksmembrom, bonvolu enspezi la kotizon, kaj, pagante al la kasisto, menci: por stopi la truon!

**ESTRARKUNVENO DE LA 8.4. 1951 EN GENT:**

La prezidanto malfermis la kunvenon je la 10-a. Post raportoj de la kasisto, la sekretario, F.E.I. kaj U.E.A., ni pritraktis la enhavon de nia revuo, por esplori la eblojn de adaptado al la diversaj deziroj kaj opinioj de niaj legantoj. La ekziĝo de nia kasisto, s-ro Dekeyzer A., kiu dum multaj jaroj prizorgis la financajn aferojn, estis akceptata.

rondschrijven aan elk inwoner met inlichtingen betreffende de te geven cursus.

Met de medewerking van het gemeentebestuur maar vooral door de toestemming en de steun van de Heer Burgemeester hebben wij dit plan ten uitvoer kunnen brengen. Ook dank zij deze hulp kunnen de lessen kosteloos gegeven worden.

Deze cursus werd op 6/1 gevolgd door 9 leerlingen. De week erop waren er 14 en in de 3e les reeds 20.

Mag dit geen succes heten voor een gemeente zoals Wilsela? Voor dit succes zorgde voornamelijk ook nog Cl. Verbeek uit Wijgmaal, die, alhoewel niet meer van de jongeren, toch een vurig Esperantist en propagandist is.

Op 3 Maart l.l. kregen wij gedurende de les het bezoek van de Heer Burgemeester, die de volgende toezeggingen deed:

1. Een officieel lokaal zal ter beschikking gesteld worden zowel voor E. lessen als voor E. vergaderingen.
2. Een zomeruitstap zal plaats vinden samen met de leerlingen van de

Ni elkore dankas lin por la multaj liberaj horoj, kiujn li oferis sur la verda altaro. Lin provizore, t.e., ĝis la ĝenerala jarkunveno en Hilversum, anstataŭas s-ano Meeus el Antwerpen.

**GENERALA JARKUNVENO EN HILVERSUM:**

**TAGORDO:**

1. Malfermo
2. Salutoj
3. Financa raporto
4. Sekretaria raporto
5. Raporto de nia U.E.A.- peranto
6. Raporto de F.E.I.
7. Raporto de la Koresponda servo
8. Statutsanĝo proponita de sekcio Mechelen
9. Rezolucio
10. Fermo.

Ni petas al niaj membroj-kongresanoj, atente legi la raporton de la ĝenerala sekretario, por ke ili povu priparoli ĝin okaze de la ĝenerala kunsido en Hilversum.

**STATUTSANGO PROPONITA DE SEKCIO MECHELEN:**

Art. 7 de la organiza regularo: (proponata teksto)

De Bond heeft in één localiteit principieel slechts een afdeling. Indien echter meer dan één afdeling gewenst is, kan er door het bondsbestuur een nieuwe aanvaard worden, nadat het de mening zal gevraagd hebben van de reeds bestaande.

**LA PRELEGOJ DE PROF. D-RO I. LAPENNA**

La komencigo de marto alportis al ni unu el la plej famaj nuntempaj Esperantistoj: la unuan de tiu monato paroladis prof. Lapenna en Brugge: li poste parolis ankaŭ en Bruselo kaj Antverpeno.

Kvankam el propaganda vidpunkto oni povus kritiki la elekton de la temo — la brugaĵoj ja preferis esti tuti inter samideanoj — ili organizis Esperantlingvan prelegon pri Jugoslavujo, lando kaj popolo, kun lumbildoj. Sekcion Blankenberge reprezentis kelkaj geamikoj, inter kiuj d-ro Couwenberg. Entute 40 geesperantistoj, plejparte junuloj, ĉeestis la brilan kaj interesegegan paroladon de prof. Lapenna, kiu ne povis kasi sian amon al la patro-lando, kvankam li iom post iom fariĝas mond-civitano.

Poste la estraro sekcia kaj kelkaj ligaj estraranoj kunvenis en pli intima rondeto, por aŭskulti la planojn kaj la proponojn de la UEA-Estraro.

Sama estis la rezulto de la prelego, kiu okazis en Antverpeno; ĝin organizis EKI tiel ke ĉirkaŭ 100 E-istoj plenigis la salonon de „De Witte Leeuw“. Ili varme aplaudis prof. Lapenna, kiu nepre flue kaj majstre parolis pri sia lando, aldonante kelkajn konsiderojn kaj direktivojn pri la propagando kaj UEA. Ne malpli ol tri reprezentantoj de UEA ĉeestis (prof. L., d-ro Kempeneers, funkcia prez. UEA kaj komitatano RBLE, d-ro Van Gindertaelen, komitatano Fl.L.E.), kiuj havis la okazon amike interbabilu kaj ekzameni diversajn problemojn. Ĉu dubi ĉu la parolado de Prof. Lapenna estos stimulo koncerne la agadon kaj la propagandon por UEA?

Flandra Ligo klopodos efektiviĝi kiel eble plej bone la instrukciojn de prof. Lapenna! Ni cetere deziras al li sukceson kaj... ĝis rivedo en nia rondo!

Franse avondlessen.

3. Een bedrag van plm. 1.000 Fr. wordt beschikbaar gesteld voor het aankopen van studie- en leesboeken over en in het Esperanto, die zullen geplaatst worden in de gemeenteboekerij en tot ieders beschikking gesteld zullen worden.

Hiervan hebben wij gretig en met veel dank gebruik gemaakt en een lijst zal ingestuurd worden, welke op dit ogenblik reeds opgemaakt is, ter goedkeuring bij het Gemeentebestuur.

Wij hopen deze eerste cursus eind April te besluiten om dan over te gaan tot het stichten van een groep, om de tegenwoordige leerlingen in de mogelijkheid te stellen zich verder te ontwikkelen in Esperanto en alzo een kern te vormen van propagandisten voor het toekomstig seizoen.

Wij willen nogmaals langs deze weg onze hartelijke dank betuigen aan de zeer sympathieke en E. steunende Heer Burgemeester van Wilsela, de Heer L. De Coux.

H. J. Boving  
26A, Hertshaag, Rotselaar.



NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

PLAATSELUK NIEUWS

PREMION akiris por VEB, post n-roj 103-104: s-ro L. Vercaemmen, el Mechelen, kaj por LEEN: s-ro W. Weenstra, el Assen.

SOLVOJ.

N-ro 105. Por korekta solvo 15 el jenaj radikoj sufiĉas: Brust, kubut, konk, gland, medol, maleol, palat, iris, dent, lang, spin, menton, intest, krani, kalkan, okul, vang, orel.

N-ro 106. *Horiz.* 1. Luyken- 2. eskarp- 3. ruĝeta; ar. 4. ĉif. 5. kriteri; eĥi. 7. nod; plimult. 8. agi. 9. al; onidir. 10. jurnal. 11. esting.

*Vert.* 1. rekantaj. 2. unu; lut. 3. ĝuinda. 4. kre; gant. 5. tremp. 6. nea; ole. 7. ĉilian. 8. skui; ist. 9. fekund. 10. tra; ien. 11. Pro Istar.

N-ro 107: KRUCVORTENIGMO.

*Horizontale.* 1. longforma frukto de samnoma planto(R); operacie forpreni(R). 2. sovaĝa besto(R). 3. serĉo en kiu ĝajmo miksigas kun seriozeco(R). plibeligi(R). 4. esti konforma kun la reguloj de bonedukiteco(R). 5. korpoparto; ago simila al agon de alia persono, konsiderata kiel modelo. 7. facile fandebila substanco en la korpo de besto(R); komenca elemento(R). 8. delokigi per premo(R). 9. fiŝo(R); konformigi(R). 10. numeralo. 11. deklari senvalora(R); manlabora profesio.

*Vertikale.* 1. ĝi estas uzata por pavimi(R); semo(R). 2. tranĉo(R). 3. masonaĵo servanta ĉe hejtado(R); parto de ebena ĉe du sin renkontantaj linioj(R). 4. elfandi feron(R). 5. iu formo de mortigo; terkulturisto tion faras(R). 6. levmaŝino(R). 7. kunli-

gi(R); jus verŝita hiero tion faras(R). 8. ŝipfajlego tion faras(R). 9. mono regule pagata al eksociisto(R); risorto estu tia(R). 10. alta konstruaĵo(R). 11. En ĝin oni metas mortinton; mezurilo.

N-ro 108: INTERMIKSU

la literojn de ĉiu vortparo, kaj aldonu literon por trovi novan vorton respondantan al la difino. La aldonitaj literoj, sinsekve legataj, formas proverbon.

La vortparoj: 1. glimo fari; 2. finu ĉaso; 3. norde hieno; 4. da ventro; 5. gasta diro; 6. formi laca; 7. gute nesto; 8. grila ŝanco; 9. relo-pano; 10. dia voli; 11. li fandu; 12. dorna tufo; 13. kela resto; 14. fali fasko; 15. naŭ rifo; 16. ruzo fluo; 17. neta bruo; 18. nuna limo; 19. trilo kuvo; 20. taksi talio; 21. garbo kato; 22. oka lafo; 23. bono triki; 24. gliti feno; 25. dane rango; 26. cigno lira; 27. pura fako; 28. agi stango; 29. Rejno seli; 30. dis ganto; 31. ridi palto; 32. tera farti; 33. hura grilo; 34. for lito.

La difinoj: 1. ŝanĝi; 2. hometo; 3. havinda fianĉino; 4. ĉiujara samdata memorigo; 5. deĵori starante ĉe poste-no; 6. glaso estas tia; 7. parto de kru-ro; 8. ĝi troviĝas ĉe buĉisto; 9. ĝi flugas; 10. ĉevalo havas ĝin; 11. stumbli; 12. en tia regiono, kulturado prosperas; 13. ĥimera projekto; 14. muzikilo; 15. virino; 16. homo pasie kolera; 17. ni ĝin ofte manĝas; 18. homo kiu ne kongigas sian nomon; 19. ili pliakrigas la vidadon; 20. riĉulo; 21. ŝipo por transporti varojn; 22. rivero en ŝtoneca regiono ofte ĝin havas; 23. parto de kruo; 24. persono kiu sin okupas pri malsanuloj; 25. soldatoj uzas ĝin en la milito; 26. belforma virino; 27. tia, ke oni ne povas ne vidi ĝin; 28. li senpage akceptas vizitanton ĉe tablo; 29. vojo fermita ĉe unu ekstremo; 30. li traserĉas valizojn; 31. ĝi servas por bariloj; 32. ekestinta por faro de homo; 33. maljunulo; 34. furago.

La solvojn sendu la nederlandanoj al S-ro G. J. Teunissen, Burg, Tellegenstr. 21 hs., Amsterdam-Z., kaj Flandra Ligo al Postbus 342 (Enigmoj), Brussel, antaŭ la 20-V-51.

*V.E.B. Afdeling Antwerpen:* Het programma voor de maand April werd als volgt afgewikkeld: 2/4- Verscheidene; 9/4- Raadsels; 14/4- Bal; 16/4- Zangavond; 23/4- Verslag over feest; 30/4- spreekbeurt. Ons bal vond plaats op 14 April in ons lokaal Carnotstraat 60 te 20 uur. Er waren talrijke vrienden uit Mechelen en Brussel opgekomen zodat, na het afrollen van films over Lier en Zwitserland, het er weldra prettig aan toeging... tot 4 uur 's morgens!

*V.E.B. Sekcio Blankenberghe:* Al ges-roj A. Marmenout-Van Steene naskiĝis la 27/2/51 dua filineto, Francine. Niajn korajn gratulojn kaj bondeziron!

*V.E.B. Afdeling Brugge:* Een hoogtepunt in ons groepsleven was de komst van d-ro Ivo LAPENNA op 1-3-1951. Uiterst boeiende en leerzame voordracht over „Zuid-Slavie, land en volk". Waren op deze spreekbeurt eveneens aanwezig: S-ano PHILIPPE uit Arras, prezidanto de la Nord Franca Federacio en S-ano LAURAT, gastprofessor aan het Europacollege te Brugge. Nadien hadden wij nog in het thuis van de voorzitter een aparte vergadering met het Bestuur... die tot 1,45 uur duurde. Daar werden de belangrijkste problemen besproken zoals de vorming van Esperantisten-Leiders, verhoging van het cultureel peil van onze beweging, de beste propaganda voor Esperanto onder de verschillende klassen van de maatschappij, enz.

Over April werd, buiten de gewone punten (zang, enigmoj, filmrubriko), het onderstaande programma verwezenlijkt: 5/4, fremdlingva poezia vespero; 12/4, cerbogiĝnastiko (gvidis: A. Dumarey); 19/4, parolado pri la administrado de la E-movado (drs. F. Roose); 26/4, parolado de Henriette de Kersgierter pri „hormonoj".

*V.E.B. Sekcio Brussel:* Jen laŭ la lastaj ŝanĝoj, diversaj sciindaĵoj por 1951: Ejo: Hotelo „Monico" (Nord), Rogiersplein, Brussel. Kunvenhor: 20-22 h.

*Estraro:* prez., s-ro De Bruyn L.; sekr-iino, f-ino Impanis, Onafhankelikheds str. 190, Molenbeek; kas-ino, f-ino De Potter.

La sekcio konsistas aktuale el 19 membroj kaj ĝi organizas du kursojn (A kaj B), gvidatajn de s-roj Mooy kaj De Bruyn kun 14 lernantoj.

La programo de aprilo estis jena: 5/4, Sciigoj pri la kongresoj en München, Hilversum kaj la someraj kursoj en Soesterberg; 12/4, Prelego de s-ro De Bruyne: E. kiel hejma lingvo: ĉu ĝenerala Esperantista koncepto?; 14/4 Partopreno en la antverpena festo; 19/4, Prelego de s-ro De Bruyn: Zamenhofa familia vivo; 26/4 Kantvespero; 27/4, EKI-kunveno: Konsideroj kaj diskutado pri la temo de la 12/4.

*V.E.B. Afdeling Gent:* Na de jaarlijkse algemene vergadering werden de daaropvolgende bijeenkomsten besteed aan een ernstig onderzoek teneinde onze werking op Esperanto-gebied doeltreffender te maken. Een eerste vrucht van deze besprekingen was de oprichting van een kern van leden, welke in het bijzonder de propaganda ten voordele van Esperanto en van onze afdeling zou organiseren. Tevens wordt alles in het werk gesteld om het programma van onze wekelijkse vergaderingen af te wisselen en aantrekkelijker te maken. Hiervoor doen wij beroep op de goede

wil van al onze leden om in de mate van het mogelijke steeds regelmatig en actief aan onze bijeenkomsten mede te werken.

*V.E.B. Sekcio Leuven:* Al ges-roj Boving, Hertschaag 26 a, Rotselaar, naskiĝis la 25-3-51 fileto Walter. Al la gepatroj niajn korajn gratulojn kaj al la fileto sanon kaj prosperon!

*V.E.B. Afdeling Mechelen:* Het programma Maart: regelmatig afgewikkeld. Dat van April zag er uit als volgt: 4/4, Klarigoj pri la kongresoj en Hilversum kaj München, feriatj semajnoj en Soesterberg kaj Helsingör; 11/4, Enigmoj; 18/4, Gramatiko; 25/4 Prelego de s-ro Goedgezelschap.

Verscheidene leden hebben zich reeds aangemeld voor ons Congres te Hilversum; andere belangstellenden worden dringend verzocht hun inzichten mede te delen, speciaal met het oog op de autobusreis Antwerpen-Hilversum en terug; slechts enkele plaatsen zijn nog beschikbaar.

De avondcursus in het kader der stadsleergangen werd geëindigd: 5 leerlingen namen deel aan het examen, waarvan de uitslag zeer bevredigend was. We heten ze welkom in onze kring en wijzen ze er op dat de vergaderingen geregeld iedere Woensdag doorgaan om 19.30 u. in het Lyceum, Veemarkt, T/S.

Al ges-roj M. Goedgezelschap naskiĝis fine de decembro 1950 fileto, Etienne. Al ili niajn korajn gratulojn, al la fileto sanon kaj prosperon!

L.E.E.N.

*Den Haag:* 3-V Ne okazos kunveno. 10-V Pritrakto de la hejmtasko. S-ro F. Weeke parolos pri la sekigado de la Suda Maro kaj montros lumbildojn pri tio. 17-V S-ro F. Weeke pritraktos „La Komercisto de Venecio" de Shakespeare. 24-V Diskuto pri la temo: ĉu la homa prudento estas beno aŭ malbeno por la homaro? 31-V Laika tribunalo.

*Den Helder:* La kurso por komentantoj finiĝis; kvar eks-kursanoj aligis al nia sekcio. Bonvenon!

*Groningen:* 3-V Ne okazos kunveno. 10-V S-ro J. Spa montros espereble lumbildojn. Kunprenu tason! 17-V F-ino A. Tuitjer rakontos pri sia laboro. 24-V F-ino A. Tebbenhof rakontos pri...? 31-V S-ino A. Albers prelegos pri la akvokondukilaro en Groningen en 1900.

*Velp:* La kurso, kiun gvidis f-ino E. Leopold, finiĝis. La 12-an de aprilo okazis festvespero, kies programon parte prizorgis la kursanoj mem. Oni montris du filmojn, kiujn afable pruntedonis s-ino J. Ravestein. Ĉiuj 14 kursanoj aligis al sekcio Arnhem. Nome de la ĉefestraro s-ro C. B. Zondervan bonvenigis la novajn anojn.

ANONCETOJ

Interŝanĝas p.m. kaj bildkartojn kun afranko bildflanka: Stadtbaumeister Heinz Duffek, Waldeggstr. 5/1, Linz, Aŭstrujo.

Nepre vizitu la standon de la libro-servo en la kongresejo!

Ni havas grandan provizon da studverkoj, romanoj, noveloj, propagandiloj, k.t.p.

Per legado vi perfektigos vian lingvoscion!

E. H. Zondervan-Visser.

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond Postbus 342 - Brussel en Ned. Esperantisten-Vereniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. (Ned.) - Drukkerij Krol, Hoofdst. 31, Uithuizen (Ned.)

DIVERSAJOJ

Urbo München eldonos specialan esperantlingvan prospekton pri München. Postulu jam nun tiun esperantlingvan prospekton senpagan ĉe Städt. Verkehrsamt, München, Sonnenstr. 24.

Germana gazeto pri junulargastejoj ŝatas ricevi raportojn de eksterlandaj junuloj pri migrado en Germanujo kaj pri vizito al germanaj junulargastejoj. Ankaŭ raportoj pri migrado eksterlando kaj pri junulargastejoj eksterlandaj akceptigas. Kontribuojn bonvolu adresi al Esperanto-Centro, München-Pasing, Engelbertstr. 7.

PRI NIA ADVOKATO

C. Huyghens (1596-1687)

Mi laŭdas mian advokaton; li ekmortas. Kaj lasas heredaĵon al frenezulej. Dirante: „ĝajnis mi havaĵon mian de Frenezaj! decasko min ĝin realportas."

trad. H. Vermuyten

POR KOLORBLINDULOJ

Inter la servistaro, kiu, sur la flugkampoj sur la vojo al Indonezio, devas prizorgi la pakajojn por la pasaĝeroj, estas multaj analfabetoj. Ne ĉiu scias legi la nomojn sur la kofro-adreskartoj. Tial la Reĝa Nederlanda Aertrafika Kompanio antaŭ kelkaj monatoj enkondukis adreskartojn kun apartaj koloroj por ĉiu loko. Tamen, tiam montriĝis, ke inter la servistaro ĉi tie kaj tie troviĝas kolorblinduloj. Tial oni enkondukis novan sistemon. Ekzistas nun nur du koloroj (kaj espereble oni scias distingi ilin): verda por la vojaĝo Amsterdam-Djakarta, ruĝa por la vojaĝo. Cetera la adreskartoj havas diferencajn formojn kaj krom tio ĉiu loko estas provizita per malgranda desegnaĵo, konforma al ĝia karaktero. Sur la adreskarto por Amsterdam oni vidas patrician domon, sur tiu de Basra daktilarbon, sur tiu de Calcutta elefanton kaj sur tiu de Kairo paron da piramidoj.

Laŭ artikoleto en „Het Parool" Trad. J. Rooker.

LA MALNOVA ĈAPETO

Foje mi serĉis ion en la subtegmentejoj. Malfermite kofron mi trovis malnovan ĉapeton el brua veluro, pri kiu mi ne memoris; mi eĉ ne sciis, ke mi iam posedis ion tian. Rapide mi malsupreniris, kaj mi ne estus vera virino, se mi ne provsurmetus tiun ĉapeton antaŭ la spegulo. Mi metis ĝin iom maldekstre sur mian kapon - - - subite mi ekŝaltis pro ektimo, ĉar malantaŭ mi eksonis voĉo. Mi rigardis kaj tie staris koboldo, malgranda, afabia koboldo, kiu plenspekte klinis sin ĝisplanke, dirante: „via moŝto, kion mi povas fari por vi?"

Mi fermis mian buŝon, kiu mi pro miro estis malfermita, ekvidis kaj ekzamenis bone la bonkoran vireton.

„Nu," li ripetis, „via moŝto nur diru, kion mi povas fari por vi. Ĉiun deziron mi plenumos, kiam vi surmetas la ĉapeton."

Senintence mi tuŝis la ĉapeton, sed feliĉe mi ne formetis ĝin. Fulmrapide mi traserĉis mian cerbon por trovi taŭgan deziron.

Nun mi antaŭe devas klarigi ion: ni do lasu la koboldon kaj la ĉapeton, kie ili estas. Antaŭ duonjaro ni proponis al la Esperanto-Klubo ĉi-urba kunveni

ĉiuhunde en nia domo por eviti tro grandan elspezon el la kaso. Surpape-re ĉio iris bone, sed - - - preskaŭ neniu venis. Kutime unu, du, tri anoj trovis la vojon al nia domo. Jes, tie mi havis la plej bonan deziron.

„Faru," mi diris al la servisto de la ĉapeto, „faru, ke hodiaŭ venos ĉiuj ur-baj klubanoj, kiujn ni havas kaj havis." „Plenumiĝos via deziro", li solene diris kaj malaperis.

Longe mi sidis sur la seĝo, pripensante, ĉu mi songas aŭ ne; poste mi metis la ĉapeton en angulon de la ŝranko, kaj - - - ne plu.

Jes, mi silentis al mia edzo pri la travivaĵo. Mi ne scias, ĉu estis saĝeco, honto, timo pro primoko, sed vere mi silentis pri tio.

Preskaŭ la oka vespere. Mi preparis teon, mia edzo prizorgis la nombrojn da seĝoj, mia filino prenis siajn sekretari-inajn paperojn. - - - Jen la sonorilo! Ĉu jam nun?

Envenis iu, kiu longe ne estis en nia klubo. Mia edzo miris, sed ĝoje bonvenigis lin. Kion alian li povus fari, ĉu ne? Denove funkciis la sonorilo. La filino malfermis la pordon. Estis du, kaj antaŭ ol si povis fermi, envenis denove klubano. Poste tri, du, kvar; en kelkaj minutoj nia provizo da seĝoj estis elĉerpita.

„Ho, mia kara koboldo", mi pensis,

„kiel taŭge vi plenumis mian taskon!"

Sed - - - aŭskultu - - - kiam la goĵo kaj miro pri la grandkala alveno iom malgrandiĝis, tiam mi rimarkis, ke neniu parolas Esperanton. Multaj forĝis, kelkaj ne kuraĝis paroli, kaj pro tio oni aŭ parolis nederlandlingve aŭ silentis.

Bona penso eklumis en mia kapo: mi steltris el la ĉambro, supren kuris la ŝtuparon, prenis la ĉapeton el la ŝranko, surmetis ĝin; - - - jes, ne estis sono... tie staras la koboldo, plenspekte klinigante: „via moŝto, kion vi deziras?"

„Faru," mi diris senhezite, (mi jam kutimiĝis al la miraklo), „ke tiuj geesperantistoj malsupre estu fervoraj kaj lertaj Esperantistoj!"

Denove la respondo: „Plenumiĝos via deziro!" kaj li malaperis.

Metinte la ĉapeton en la ŝrankon, mi rapidis malsupren kaj jam en la koridoro mi aŭdis vigan interparoladon Esperantlingvan. Estis belega vespero: ni juris grandegajn planojn, ĉiuj estis fervoraj, entuziasmaj, kaj malfrue en la nokto ni disigiĝis.

La sekvant mateno mi prenis la ĉapeton, mi bone brosis ĝin, por ke ĝi ne aspektu tiel malpura, tiel polva. Mi brosis ĝin antaŭ la malfermita fenestro. Jes, - - - vi jam komprenas; ĝi falis el la fenestro sur la herbejon en nia ĝar-